

Esperanto-vivo en Svislando
Nombro de la esperantistoj
Claude Gacond, 390-a radioprelego, 1971.03.31 & 04.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- Estas malfacile koni la nombron de la esperantistoj en Svislando, ĉar, kiel verŝajne en aliaj landoj, ne ĉiuj praktikantoj de la lingvo internacia aliĝas al esperanto-societo. De pluraj jaroj ni provis registri la nomojn kaj adresojn de la esperantistoj. Laŭ nia adresaro ni povas aserti, ke en Svislando vivas proksimume milo da esperantistoj.

Cl.- La kvarono de tiuj personoj estas pli malpli aktiva kaj ligita al la ĉefa societo : Svisa Esperanto-Societo.

A.- Alia kvarono kontentiĝas aliĝi al lokaj aŭ fakaj rondoj.

.Cl.- La restanta duono de la svisa esperantistaro dividiĝas en du grupoj. Estas la grupo de la komencantoj, kies parto baldaŭ aliĝos al la svisa aŭ nur al loka societo. En nia sliparo ni nun havas 273 tiajn adresojn de komencantoj.

A.- La restantaj personoj estas izoluloj. Iliajn adresojn ni iom post iom rikoltas dank'al la vendado de libroj aŭ ricevado de informpetoj. Ni povis konstati, ke tiuj izoluloj pagas kotizon al societo, nur kiam ili havas tujan profiton. Ekzemple ili aliĝas al UEA la jaron, kiam ili vizitas Universalan Kongreson.

Cl.- Komence de tiu ĉi jaro ni entreprenis varb-agadon en la celo malaltigi la nombron de la izoluloj profite al la societo tutsvisa kaj al ties organo *Svisa Espero*.

A.- Ni dissendis tri specimenajn ekzemplerojn de la plaĉa kaj modernigita monata revuo *Svisa Espero*. Jen kiel komenciĝis la akompana cirkulero :

Cl.- « **Svisa Espero** estas la oficiala organo de la esperantistoj en Svislando. Ĝin eldonas Svisa Esperanto-Societo en kunlaboro kun la lokaj kaj fakaj rondoj esperantistaj en Svislando.

A.- *Monaton post monato Svisa Espero alportas akuratan informadon pri la esperantomovado ĝenerale, pri la vivo de la lokaj grupoj, la laboro de la fakaj rondoj, la kongresoj kaj manifestacioj esperantistaj, kiuj havas intereson por svisoj, pri la novaj libroj kaj diskoj, kaj pri kulturaj kaj literaturaj temoj, ktp. »*

Cl.- Post kelkaj aliaj klarigoj tiu cirkulero ankoraŭ diris :

A.- « *Kiam vi estos leginta la specimenajn numerojn de Svisa Espero, kiuj akompanas tiun ĉi informilon, tiam vi certe pozitive reagos al nia invito aboni tiun plaĉan kaj modernan revuon, fariĝante samtempe membro de Svisa Esperanto-Societo. »*

Cl.- Tiam sekvis indikoj pri la abontarifo kun aŭ sen membreco al Svisa Esperanto-Societo.

A.- Per tiu agado, kiun Kultura Centro Esperantista decidis ripeti komence de ĉiu jaro, kaj kiu okazis por la unua fojo en 1971, ni provos varbi al la ĉefa societo de Svislando tiun esperantistaron, kiu restas neorganizita. Ĝis nun ni ne ankoraŭ povis kalkuli la efikecon de la unua agado, kiu tuŝis centon da personoj.

Cl.- Estus interese scii, kial tiuj esperantistoj restas izolitaj. Ni komencis enketon, kiu malkovrigis al ni plurajn kaŭzojn de tiu emo al izoleco.

A.- La plimulto de la izoluloj foje estis membroj de esperanto-societo. En tiu societo ili havis malagrablajn kontaktojn aŭ ne trovis la servojn, kiujn ili serĉis. Tre ofte la loka vivo kaj la

Esperanto-vivo en Svislando
Nombro de la esperantistoj
Claude Gacond, 390-a radioprelego, 1971.03.31 & 04.03

tutsvisaj kunvenoj ne estas terure entuziasmigaj. Post partopreno en enuiga kaj foje maltaŭge organizita ĝenerala kunsido multaj novuloj ne plu pagas sian jarkotizon. Ili fariĝas izoluloj.

Cl.- Se ni deziras reallogi tiun klientaron, ni nepre devos plialtigi la kulturan nivelon en niaj lokaj grupoj kaj tutsvisa societo.

A.- Alia granda nombro da izoluloj estas formita de personoj, kiuj tute ne scias, ke ekzistas esperanto-societoj. Plej ofte ili lernis esperanton en vespera kurso, kie la instruanto nur instruis pri gramatiko, en lernejo, kie la instruanto evitis paroli pri la loka grupo pro timo, ke la ĝelernantoj ricevos malbonan impreson pri la esperanto-vivo, se ili vizitos unu el ĝiaj kunvenoj ; foje ili estas memlernantoj kaj en la lernolibroj oni ne trovas multajn informojn pri la esperanto-movado.

Cl.- En tiu publiko vi ofte renkontas personojn, kiuj diras al vi :

A.- « *Ha, esperanto ankoraŭ ekzistas ! Mi kredis, ke de longe ĝi mortis!* »

Cl.- Nur pri la esperanto-gramatiko ili havas informojn. Pri la literaturo, societoj, gazetoj, kongresoj, ili nenion scias.

A.- Por ripari tiun mankon de informado pri la esperanto-movado ĝenerale, ni entreprenis agadon ekde februaro 1970. Ni provis rikolti la nomojn kaj adresojn de ĉiuj novaj esperantistoj : kursanoj, memlernantoj, plenkreskuloj kaj infanoj. Al ili ni dissendadis la revuon *Svisa Espero* dum tuta jaro. 273 personoj nun profitas pri tiu agado. Cirkulero anoncis al ĉiu la komencon de tiu agado.

Cl.- Nun komenciĝos nova agado. Nova cirkulero anoncos, ke la agado finiĝas. Ĝi instigos la profitintojn aboni al *Svisa Espero* kaj aliĝi al Svisa Esperanto-Societo. Ni esperas, ke kvarono el la profitintoj pozitive reagos je tiu unua invito fariĝi aktivaj esperantistoj.

A.- Ni konscias, ke ĉiam restos rondo de izoluloj. Estas multaj personoj, kiuj rifuzas aliĝi al societo pro principo. Ili vidas en la societoj instrumentojn, kiuj forrabas parton de la individua libereco. Al tiu klientaro ni devas proponi servojn.

Cl.- La venontan semajnon ni parolos pri alia aspekto de la esperanto-vivo en Svislando.

A.- Al ĉiuj geaŭdantoj, kiuj skribos, ni sendos specimenajn numerojn de *Svisa Espero*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-